



LA DUKINA KUIREJO.

PRI LA PORKINFANO 53

“Ho, tute ne utilas paroli al *li*” diris ŝi “li ja estas sencerbulo.”

Dirinte tion, ŝi malfermis mem la pordon kaj — eniris.

La pordo kondukis rekte en grandan kuirejon, kiu estis laŭ ĝia tuta longo plena je fumo. Jen en la mezo, sur tripieda skabelo sidas la Dukino vartante infaneton: la kuiristino kurbiĝas super la fajro, kaj ĉirkaŭmovas per granda ferkulero la enhavon—kredeble ian supaĵon—de unu granda kaldrono.

“Tiu supo certege enhavas tro da pipro” diris al si Alicio; pro konstantaj terneksplodoj apenaŭ ŝi povis eligi la vortojn. Eĉ la Dukino ternis ne malofte; la infano senĉese aŭ ternis aŭ plorkriegis, kaj en la kuirejo *ne* ternadis nur la kuiristino kaj unu granda kato kiu sidas apud la fajrujo kaj grimacas kun la buŝo etendita de unu orelo ĝis la alia.

“Bonvolu, mi petas, klarigi al mi” Alicio komencis timeme (ĉar ŝi iom dubis ĉu estas laŭ bonmoroj ke ŝi parolu unua) pro kio via kato grimacas tiamaniere?”

“Ĝi estas *Cheshire*¹ kato, kaj jen kial!” diris la Dukino. “Vi Porko!”

Ŝi parolis la lastajn vortojn kun tĉa subita

¹ *Cheshire* (Ĉeŝŝa) estas la angla graflando en kiu sidas la urbo *Chester* (Ĉesta); ekzistas popoldiro ke nur en tiu graflando la katoj havas la kapablon grimaci.